

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2013: 3

Antaŭ 60 jaroj la jarraporto
de SEF en La Espero

Kelkaj visaĝoj dum
la kongreso 2013

Fotis Olof Pettersson



Sveda Esperanto-Federaaio

Jarraporto 1952

Estraro

La estraro konsistis el jenaj personoj: J. Strönné, prez.; B. Joelsson, v. prez.; H. Törnskog, sekr.; E. Stridell, 1-a v. sekr.; Gulli Svensson, 2-a v. sekr.; R. Enocson, kasisto, kaj Sonja Morariu, v. kasisto. Anstataŭantoj: Sune Ahlm, Stockholm, kaj Einar Hult, Arvika, tutlanda studgvidanto.

Membraro

La 31-an de decembro 1952 SEF havis 1792 membrojn. El ili 1432 apartenis al 63 grupoj kaj 360 estis individuaj membroj el multaj lokoj. Novaj kluboj fondiĝis dum la jaro en Malmberget kaj Norrahammar. Malfondiĝis dum la jaro la kluboj en Ludvika kaj Hässleholm.

Ekonomiaj subtenantoj

"Amikaro de SEF" daŭre ĝojas pri ĉiuj membroj, kiuj volas doni ekonomian helpon al SEF. Per la ordinaraj membrokotizoj SEF povas pagi nur la luprezon de la sekretario kaj krome kelkajn detalojn tie. Sed por la propaganda laboro, presadoj k.t.p. ni bezonas pli da mono. La estraro dissendis en 1952 cirkuleron al



La novelektita estraro (ne kompleta): Roland L, Stella L, Olof P, Dan P, Ann-Louise Å, Puff Ö



Aŭskultantoj



Nova (Ann-Louise Åkerlund) kaj antaŭa prezidantoj (Roland Lindblom)

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2013 • 101-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: laespero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

Tryck: Pingvinpress, Råå

Prenumeration 2013: 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro, tel. 08-34 08 00

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Plusgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2013:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggssexemplar kostar 100 kr/år).

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com **Telefon:** 070-5850054

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.esperanto.se (meny Esperanto-Gården)

E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

e-post: laespero@esperanto.se

	<i>Stopppdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5-6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Adressånge(j)

Refoje mi atentigas pri tio, ke pasintan jaron mi transloĝiĝis al la suba adreso. la antaŭa do ne plu estas **Kalverstraat 8-B, 8011 LH Zwolle.**

kore salutas

Gerrit Berveling

Van Vredenburgweg 435

2284 TA Rijswijk

Nederlando

+31 (0)70-2134914

Ĉu ankaŭ vi transloĝiĝis?

Ne forgesu sendi informon al ni se vi transloĝiĝas. Sendu al

Dan Palm

Umeågatan 22C

252 77 Helsingborg

042-24 45 05

0701-70 94 60

(dan_palm@comhem.se)

Karin Lindqvist forpasis

Lastmomente, dum la redaktado de la nuna numero de La Espero, ni ricevis informon ke Karin Lindqvist forpasis. En sekvonta numero ni prezentos pli longan nekrologon.

Redaktoraj vortoj

Sur la fronta paĝo vi vidas sparton el la nove elektita estraro. Estas esperige vidi ke ni havas du novajn virinojn en la estraro, Stella Lindblom kaj Puff Östling. Kun iliaj estraraniĝoj malaltiĝis la mezaĝo de la estraro. Pli grave tamen, ke la estraro riĉiĝis per novaj kreivaj membroj kaj ties ideoj kiel SEF antaŭeniriu.

Mi ankaŭ volas deziri al la nova prezidantino, prosperan laboron. La tasko ne estas tute simpla se ni volas turni la evoluon de SEF. La membraro ankaŭ pasintjare malkreskis bedaŭrinde. Kion ni povas fari por vastigi la intereson pri Esperanto?

La moderna tekniko ĉirkaŭas nin. Kvankam mi ĉiutage uzas interreton kaj komputilon kaj in-

stigas aliajn pli efike uzi la ilojn, mi mem ne uzas ĉiujn eblecojn komuniki kaj agi per la moderna tekniko. Parte mi hezitas. Estus interese iom aŭdi de la legantoj kiel vi uzas la eblecojn kiujn la modernaj komunikiloj ebligas. Ĉu vi parolas kun esperanto-amik(in)on per Skype ekzemple? Aŭ ĉu vi sekvas esperantlingvan blogon? Skribu mallonge kiel vi utiligas la modernajn ilojn por ke aliaj eble havu ideojn kaj emon provi ion novan aŭ simple vidu ke aliaj sammaniere faras kiel vi.

La sekvonta numero aperos septembre post someraj vojaĝoj kaj kongresoj. Mi volonte publikigos viajn vojaĝrakontojn kaj bildojn. Ne hezitu sendi al La Espero.

Havu bonan someron kaj travivaĵojn per Esperanto!

Prelego de Stefano Keller, Estrarano de UEA
Sveda Esperanto-Kongreso, Karlstad,
12 majo 2013 (resumo)

LINGVAJ HOMAJ RAJTOJ estas fundamentaj lingvaj rajtoj, kiuj baziĝas sur kelkaj el la homaj rajtoj laŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (UDHR). Tiuj estas lingvaj rajtoj, kies respekto permesas al ĉiu persono plene, en homa digneco vivi, uzi sian gepatran lingvon, esti respektata sendepende de ĉiuspecaj diversecoj rilate aliuojn.

Celoj de la agado de UEA: a) respekto al la parolantoj de ĉiu lingvo, b) realigo de justa komunikado, lingva justeco, c) proponi Esperanton, kiel alternativon elinter la lingvoj, por la interetna komunikado, ĉar per ĝi realiĝas respekto al la identeco de ĉiuj. Lingvo estas menciita en la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj sed ne aperas en la paragrafo pri edukado. Ankaŭ en la realeco diversaj homgrupoj havas diversajn rajtojn, laŭ la ekzistantaj hierarkioj iuj havas pli da rajtoj: lingvaj plimulto de regantoj super minoritatoj, indiĝenaj popoloj, enmigrintoj, rifuĝintoj; parolantoj de voĉlingvoj super gestolingvanoj.

Lingvaj Homaj Rajtoj povus efiki favore al: integriĝo kaj defendo de popoloj kontraŭ perforta asimilado, pozitivaj ŝtat-

politikoj pri minoritataj lingvoj, prevento de lingva genocido, konservado de la monda lingva diverseco, preventado de konfliktoj. Speciale la rajto je edukado en la gepatra lingvo estas inter la plej gravaj rajtoj de ĉiu minoritato. Sen tiu rajto, infanoj de minoritato en lernejo devas akcepti instruadon per la lingvo de la plimulto, ne povos integriĝi, devas transpreni la regantan lingvon: lingvo/ identeco-perdo.

La lingvoj de la mondo ne estas protektataj, konservataj! Ili estas mortigataj nuntempe pli rapide ol iam ajn antaŭe en la homa

historio. Laŭ pesimismaj, sed realismaj taksadoj: 90-95% de la lingvoj malaperos ĝis la jaro 2100, aŭ estos severe endanĝerigata.

Kial lingvoj malaperas? Ili mortas (malaperas nature) aŭ estas mortigataj (oni bruligas bibliotekojn, edukaj sistemoj kaj amaskomunikiloj partoprenas en la eliminado: lingva kaj kultura 'genocido'). 'Grandajn' lingvojn oni lernas subtrahe (-), 'je kosto' de la gepatra lingvo, ne aldone (+) al la gepatra, tial ili iĝas 'murda lingvoj'. Sed, *esti* murda lingvo NE estas karakterizaĵo de lingvo. Temas pri funkciado en rilato kun aliaj lingvoj. Iu ajn lingvo povas iĝi murda en rilato kun aliaj. Ne lingvoj 'murdas' unu la alian. Temas pri forto-rilato inter parolantoj de la lingvoj, malegalaj homaj rilatoj estas malantaŭ malegalaj rilatoj de lingvoj. 'Murda lingvoj' serioze minacas la mondan lingvan diversecon. *La angla lingvo estas hodiaŭ la plej granda murda lingvo en la mondo.*

Ni bezonas Lingvajn Homajn Rajtojn en la edukado kaj konservadon, plu-evoluigon de ĉiu lingvo de la mondo. Multaj kialoj ekzistas por havi lingvajn homajn rajtojn, unu tre gravas: la interdependeco de *biodiverseco kaj lingva kaj kultura diversecoj*.

Pri UEA, lingvaj rajtoj, UN, Unesko: UEA estas en oficialaj rilatoj kun UN, Unesko, havas 15 komisiitojn en Ĝenevo, Novjorko, Vieno, Parizo. Ĉefloko de eventoj por la homrajta programo de UN estas la Palaco de Nacioj, Ĝenevo.

La programo de Unuiĝintaj Nacioj pri Homaj Rajtoj celas realigi, defendi la homajn rajtojn de ĉiuj, stimuli, kontroli pri ties respekto tutmonde. Tiun laboron faras diversaj institucioj, organoj, mekanismoj de UN, kies komuna celo estas la defendado kaj akirigo de la homaj rajtoj civilaj, kulturaj, (lingvaj), ekonomiaj, politikaj kaj sociaj, internacie agnoskitaj kaj proklamitaj kadre de la UDHR en 1948. Posteno kaj oficejo de Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj ekzistas ekde 1993. Kiel tutmonda

aŭtoritato pri homaj rajtoj, tiu oficejo respondecas pri la efektigo de la homrajta programo de UN, kunlaborante kun registaroj, naciaj homrajtaj institucioj, NROj kaj aliaj agantoj de la civila socio por engaĝigi ĉiujn favore al la homaj rajtoj.

Okazas UN-eventoj, rilataj al la homaj rajtoj, ankaŭ *ekster la ĉefaj UN-oficejoj*. Konferenco de NRO-j okazis en Bonn (2011) kaj alia en Rio (2012), en kiuj aktivis esperantistoj.

Homrajta Konsilio (HRK): ĉefa organo interregistara de UN, respondecas pri homaj rajtoj. 47 membro-ŝtatoj, pluraj kunsidoj jare. Ĉeftasko: elimini rompojn de homaj rajtoj. NRO-j povas ĉeesti, observi, kontribui dum kunsidoj. Ĝiaj organoj, taskoj, mekanismoj:

1. *Universala perioda ekzameno*, membro-ŝtatoj estas ekzamenataj pri respekto de homaj rajtoj.
2. *Konsulta komitato*: laboras pri la pliefikigo de la HRK.
3. *Proceduro de plendoj*: traktas kazojn de rompoj de homaj rajtoj.
4. *Specialaj proceduroj*: kontrolo, konsilado, raportado pri la situacio koncerne homajn rajtojn.
5. *Laborgrupoj*: pri rajto je evoluo, pri progreso, ekzamenado de ŝtatraportoj.
6. **Socia Forumo**: Unua kunsido en 2008 pri: malriĉeco. *UEA intervenis*, (*ekde tiam regule okazas alparoloj de UEA-komisiitoj*).
7. **Forumo pri Minoritatoj**: Raporto de sendependa eksperto kaj informoj de la civila socio. Unua sesio en 2008. *UEA intervenis ĉiujare dekomence*.
8. **Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj**: kun sendependaj ekspertoj, speciala raportanto. *UEA alparolas ĉiujare en tiu kunsido*.
9. *Mekanismoj de priŝekvado* de la agadprogramo kontraŭ diskriminacio.

- UEA iĝis pli aktive partoprenanta en la laboro de la UN-sistemo per sia Simpozio pri lingvaj rajtoj, okazinta ĉe UN, Ĝenevo (2008). Ekde tiam oftas parolaj intervenoj de UEA-komisiitoj pri Lingvaj Rajtoj.

Stefano Keller prelegas
Fotis Olof Pettersson



75-jara: La Espero – Svenska Esperantotidningen

La artikolon trovis Per-Olov Johansson en la arĥivo de la klubo en Malmö.

1988: Ahlm, Sune. 75-jara: La Espero - Svenska Esperantotidningen. En: La Espero (Svedio) 76-a jaro, 1988, n-ro 2, p. 20-21

Dum la 75 jaroj inter 1913 kaj 1988, aperis ĉ. 800 numeroj. Nombro de paĝoj inter 4 kaj 24, meznombre 10, faras 8000 paĝojn, kaj la dikeco de la tuta kolektaĵo estas ĉ. 50 cm. Tio estas nia revuo el statistika vidpunkto. Nun iom da historio: Tio, kio okazis en Svedio antaŭ 1913, estas: La unua lernolibro por svedoj aperis en 1889. La Sveda Esperanto-Federacio fondiĝis en 1906. Svedaj Esperanto-gazetoj en tiuj unuaj jaroj estis: *Esperantisten*, redaktata de P. Ahlberg 1906-08. Post lia transiro al Ido, *Dana Esperantisto* servis kiel organo de SEF. La jarojn 1910-12 John Lundgren en Hedemora eldonis la gazeton *Sveda Esperantisto*. En Helsingborg G. H. Backman sporade eldonis sian *Esperanto-Folket* 1911-12.

Per la naskiĝo de *La Espero* finfine solviĝis la problemo pri federacia organo. Estis la Esperantosocieto de Gefle, Juna Espero, kiu en la jaro 1913 aperigis la unuan numeron de *La Espero*. Ĝia redaktoro estis la tiam 18-jara Rudolf Pehrsson, kiu spertiĝis per eldonado de la kluba gazeto *Esperanto-Folio*. Pro lia militservo, la redaktoran laboron transprenis John Lundgren (1915-18), sekvanta de Paul Nylén (ĝis 1920). Dum ĉi tiu tempo, la presejo estis en Gävle ĝis 1919, kiam oni translokiĝis al Stockholm por esti pli proksime al la nova redaktoro. Henning Halldor en 1921 ekgvidis la sorton de la federacia organo. Estante jam redaktoro de sveda fakgazeto, li posedis gravan sperton pri redaktado kaj eldonado. (Li estis ankaŭ kunfondinto de Eldona Societo.)

Dum siaj unuaj 12 jaroj, *La Espero* aperis en normala formato de tiaj revuoj (hodiaŭ nomata A4). Sed en 1925 oni malgrandigis ĝin al duona formato (nun A5), provizis ĝin per verda kovrilo kaj duobligis la nombron de paĝoj. La titolo fariĝis *Svenska Esper-*

anto-Tidningen, kun subtitolo *La Espero*.

Kiam Halldor eksiĝis de sia posteno en junio 1927, Paul Nylén konsentis denove provizore redakti, ĝis kiam oni trovos novan entuziasmulon. En Ludvika loĝis kaj laboris tiam Bernhard Eriksson kiel presisto. El lia presejo jam aperis kelkaj jarkolektoj de *La Espero*. Kiam li translokiĝis sin kaj sian presejon al Stockholm, montriĝis bona solvo elekti lin nova redaktoro. En lia presejo, Sture-Tryckeriet, oni presis la gazeton ĝis 1980! Li restis kiel redaktoro ĝis junio 1938. Dume, en la jaro 1935, oni reiris al la "normala" formato A4.

La unua virina redaktoro fariĝis Eva Julin, kiam ŝi en oktobro 1938 akceptis tiun honoroficon. Ŝi kuraĝe strebadis dum la militaj jaroj ĝis novembro 1946. En februaro 1940 la verda koloro de la frontpaĝo malaperis por ŝpari monon – sed ĝi reaperis en 1946, samtempe kun la nova redaktoro Oskar Svantesson.

Li eltenis ĝis 1950, kaj dum serĉado de posteulo, provizore redaktis Sune Ahlm (estante estro de Eldona Societo). Ek de aprilo 1951 Bengt Joelsson estis preta surprizi la gravan taskon kunordigi la redakcian materialon. En julio 1953 li tamen petis eksiĝon kaj la redaktora stafeto estis transdonita al la tutsvedie kaj internacie konata Tiberio Morariu. Dum lia regado la frontpaĝo denove ŝanĝis aspekton, ricevan te novan logotipon, kun *La Espero* kiel ĉefa nomo kaj *Svenska Esperanto-Tidningen* kiel subtitolo. Sune Ahlm kaj Franko Luin estis t.n. teknikaj helpantoj, ankaŭ sub la redaktoreco de Åke Blomberg, kiu sekvis post la eksiĝo de Tiberio en 1969.

En julio 1977 Franko Luin kiel nova redaktoro donis novan aspekton al kaj la ekstero kaj la interno de la gazeto. Nova logotipo aperis kaj la verda koloro

malaperis en 1973. Aliaj ŝanĝoj de la frontpaĝo okazis en 1976, 1978 kaj 1980. En 1981 oni malgrandigis la formaton pro tio, ke la presado estis transprenita al la propra presejo en Esperanto-Centro. La titolpaĝo denove fariĝis kolora dum kelkaj jaroj, ĝis 1984. En novembro 1983 Karin Lindquist transprenis la redaktoran titolon, kaj kune kun sia redakcia komitato ŝi daŭre gvidas la entreprenon, provante pluenliveri *La Espero* al novaj generacioj.

La respondeca eldonisto de *La Espero* – kaj komence ĝia ekonomia garantianto – estis de 1913 ĝis 1973 W. Wahlund. Post lia forpaso estis elektita Bertil Åkerberg.

Estus interese iom citi el la diversaj jarkolektoj, sed, trafoliu-mante ĉiujn revuojn de 1925 ĝis 1987, mi trovis, ke validas la sentenco "Nenio nova sub la suno" ankaŭ koncerne la enhavon de *La Espero*. Oni klopodis ĉiamaniere trovi rimedojn plimultiĝi la membraron, kaj same provis ardigi la jam konvinkitajn por plua, pli rapida progreso. Oni penis trovi novajn vojojn por financi la laboron. Sed ĉio ĉi-riilate sekvis la ĝeneralan evoluon de la socio, la metodoj de antaŭ 50 jaroj, kaj la maniero lingve prezenti ilin, ŝajnas al ni hodiaŭ iomete naivaj. Nun novaj, kaj certe pli efikaj, metodoj progresigis nian aferon estos prezentataj al la legantaro de *La Espero*.

Restas do danki al ĉiuj kontribuantoj al la progreso dum la pasintaj 75 jaroj, kaj deziri ĉion bonan al la redakcioj laborantaj dum la sekvantaj 25 jaroj ĝis la 100-jara jubileo. Ĉar *La Espero* jam nun certe estas unu el la plej aĝaj daŭre aperantaj esperantaj revuoj, ni kun fiero povas ĝojkrii: Ni neniam perdos *La Esperon!*

Sune W. Ahlm

Gåvor till SEF

Y. Sörman har skänkt 1000:-

T. Samuelsson har skänkt 3000:-

Styrelsen tackar för gåvorna



Sommarkurser på Esperanto-Gården 14-17 juli

Start på söndag 14 juli 2013 med middag kl. 17.00, därefter kurs fram t.o.m. onsdag eftermiddag den 17 juli kl. 16.00, med möjligheter för deltagare att komma tidigare och/eller stanna längre (OBS, kursen har förkortats jämfört med tidigare information).

Esperantokurs för barn.

Nybörjarkurs.

Fortsättningskurs.

Konversation, stil och grammatik.

Esperanto-Gården är vandrarhem och kursgård i Lesjöfors i Värmland, mittemellan Göteborg, Stockholm och Oslo. Alla får användning för sina esperantokunskaper direkt. Möjlighet att resa vidare till esperantokongressen i Island från kursen.

Kunniga lärare, bland andra **Natasha Bertse** som leder konversationen och

sångstunderna, ansvarig för barnkursen är **Anna Ritamäki-Sjöstrand**.

Föreläsningar och programpunkter med flera ledare, t.ex: Anna Ritamäki-Sjöstrand, lagberedare för Ålands landskapsregering, föreläser om Ålands självstyrelse (på esperanto förstås) och berättar om esperanto i familjen tillsammans med sin mor Carola Antskog och sin dotter Sigrid Sjöstrand.

Priser för hela kursen

(inklusive flerbäddsrum och mat):

- Vuxna utan rabatt: 1600 kr
- Barn 13 -18 år, studerande, arbetslösa, pensionärer: 1300 kr
- Barn 5 -12 år 500 kr
- Barn upp till fyra år gratis.
- Tillägg för enkelrum 225 kr, dubbelrum 150 kr/pers.

Möjlighet till tält och/eller

husvagnsboende (rabatt jämfört med ordinarie priser)

Anmälningar:

s13@esperanto.se

tel. 0590-309 09.

Har du ett programförslag kontakta oss, gärna per e-post. Anna Ritamäki-Sjöstrands telefonnummer är +358-50-370 3146.

Mera info på www.esperantogarden.se

(går till Esperanto-Gårdens sida i esperantosverige.se) eller kontakta oss som ovan eller på den ordinarie adressen

Esperanto-Gården

Stiftelsev. 1

680 96 Lesjöfors

0590-309 09

e-post: egarden@esperanto.se

Välkommen till – Sveda-agado – bonvenigas vin

S*veda-agado* är en e-postgrupp om för och på esperanto. Tidigare fanns det en e-postgrupp som kallades Svesp-1 som samlade väldigt många. Sveda-agado finns till för alla som har ett aktivt intresse för esperanto i svenska sammanhang i vid mening.

Huvudspråket är esperanto, så för att du ska få ut något av listan rekommenderar vi att du förstår esperanto (kan grunderna och har viljan att lära dig), men svenska och andra skandinaviska språk är också välkomna liksom ibland andra språk. Mer information om gruppen på esperanto nedan.

Gruppen är sluten. Bara medlemmar kan se meddelandena, men listledaren har rätt att skicka ut listor över medlemmarna till listan.

Du anmäler dig på

groups.yahoo.com/group/Sveda-agado eller skicka e-post till listledaren Anna Ritamäki-Sjöstrand anna.ritamaki@esperanto.se så hjälper hon dig.

S*veda-agado* estas retgrupo pri, por kaj en esperanto. La listo estas por tiuj, al kiuj mankas la listo Svesp-1, kiu de jaroj ne plu funkcias, kaj al ĉiuj personoj kun aktiva intereso pri sveda agado pri, por kaj en esperanto.

La ĉefa lingvo de la grupo estas esperanto, sed bonvenaj estas ankaŭ la sveda lingvo, aliaj skandinavaj lingvoj kaj de tempo al tempo pliaj lingvoj.

La grupo estas fermita. Nur membroj povas legi la mesaĝojn. La listgvidanto rajtas alsendi liston de membroj (nomo, retadreso, eventuala posteno en esperanto-organizo aŭ simile) al la retlisto. Estas rekomendite ke ĉiuj sendu mallongan prezenton pri si mem al Sveda-agado.

La grupo ne estas celita por amassendoj. Se vi havas informon pri evento, artikolo aŭ programo,

asocio, kiu havas evidentan ligan al sveda-agado sendu ĝin al sveda-agado, sed ne uzu la liston por amassendoj (ekz. reklamoj pri eventoj en alia lando, kiuj ne havas evidentan ligan al sveda-agado; tia evidenta ligo estas ekz. ke vi mem planas partopreni).

Ni supozeble preparos pliajn regulojn por la grupo estonte. Sveda-agado estu pozitiva grupo, kie eblu agadi ankaŭ por solvi problemojn. La grupo celas kompletigi aliajn agadojn inkluzive de kunlaborado en esperantosverige.se.

Aliĝu je

groups.yahoo.com/group/Sveda-agado aŭ skribu al la listogvidanto Anna Ritamäki-Sjöstrand anna.ritamaki@esperanto.se helpos vin.

Informiĝu, informu, diskutu, lernu, kleriĝu, agadu!

Anna Ritamäki-Sjöstrand, Bengt Nordlöf, iniciativtagare/iniciantoj

La Rakonto pri Kjeŭ

Verkis: Nguÿen Du.
Tradukis: Lê Cao Phan.


248 paĝoj, 21 cm
Bind. Serio Oriento-Okcidento,
n-ro 48
18.00 eŭroj ĉe www.uea.org

Mi devas konfesi ke mi ofte esta iom hezitema antaŭ ol aĉeti poezian libron. *La rakonton pri Kjeŭ* mi tamen aĉetis, ĉar ĝi estas la 48-a libro de Serio Oriento-Okcidento, kiun mi kolektas. Foliumante la libron mi vidis ke sur kvar paĝoj aperas proza resumo de la enhavo, pro kiu mi jam dekomence komprenis la enhavon kaj tute facile povis legi la preskaŭ 200 paĝojn kun poezio. La talenta junulino Kjeŭ promesis geedziĝi kun junulo

Kim Tron. Kjeŭ tamen en sonĝo renkontas fantomon, kiu diras ke ŝi estos prostituitino. La ĉefa parto de la poemo temas pri la vivo de Kjeŭ kiel prostituitino, dum kiu pluraj klientoj montriĝas helpemaj, kaj tiel diversmaniere klopodos savi Kjeŭ. La fino de la rakonto estas feliĉa, sed mi ne rakontos kiel en tiu ĉi recenzo.

La libro estas verkita en la vjetnama en la komenco de la 19-a jarcento, kaj estis bazita sur ĉina proza romano. Mi vere sentas ke la celo de Serio Oriento-Okcidento estas grava. Ni konatiĝu kun diverslandaj kulturoj. Tial la jena epopeo estas grava. La traduko estas flua kaj belsona. Mankas nenecese malfacilaj vortoj. Akompanas la rakonton multaj tekstoj kiuj klarigas ĝian fonon.

La libro finiĝas per la vortoj:



„Tiuj versoj senintencaj kaj aĉformaj distru vin dum kelkaj horoj, se sendormaj.”

Ĉar la versoj ne estas aĉformaj, tiuj vortoj estas tro modestaj.

Leif Nordenstorm

Unua komuniko – justa komunikado, en la sveda

Köp dekalen !! (se bild nedan)

Esperanto 2013

Rättvis
kommunkation

12 etiketter per ark;
• 1 ark 20 kr,
• 5 ark 60 kr.

Priserna inkl porto.

Betalas till pg
2012-3,
ange "2013".

Esperantotalande driver under 2013 en kampanj för språklig rättvisa under parollen "Justa komunikado" (Rättvis kommunikation) i anslutning till den 98:e esperanto-världskongressen som kommer att äga rum i juli i det prestigefyllda konferenscentret Harpa i Reykjavik på Island. Kongressen kommer att ha samma tema och väntas samla cirka 1 000 deltagare från mer än 50 länder.

Efter den korta perioden 125 år sedan dess tillkomst är esperanto nu bland de 100 mest använda språken av ungefär 6 800 språk som talas i världen. Det är det

30:e största språket av 285 i Wikipedia sett till antal artiklar (11 feb 2013). Esperanto finns som valbart språk bland annat i Googles sökmotor, Skype, webbläsaren Firefox, operativsystemet Ubuntu och på Facebook. Google Translate lade för ungefär ett år sedan till esperanto som det 64:e språket i sin lista med i dagsläget 66 språk som stöds för automatisk översättning. Även många av dagens smartphones har stöd för esperanto.

Fler människor talar nu esperanto än isländska, enligt boken The World Factbook som publiceras av amerikanska CIA.

Undervisning i esperanto erbjuds officiellt vid 150 universitet och andra institutioner för högre utbildning, och i 600 skolor på grund- och gymnasienivå i 28 länder. Det har ett rikt utbud av litteratur som består av mer än 50 000 titlar, och nya publikationer ges ut varje vecka. Förutom poddradiosändningar i många länder finns en webbradiostation med namnet "Muzaiko" som

sänder dygnet runt, och internet-tv i Kina.

Utvecklingen av esperanto bromsades på grund av fördomar och okunskap om språket. Adolf Hitler och Josef Stalin förföljde esperantister. Båda dessa män är nu borta, medan esperanto blev kvar, växte och utvecklades, och används nu aktivt för mellanfolklig kommunikation mellan tusentals och åter tusentals människor i mer än 100 länder i världen.

UEA (Universala Esperanto-Asocio) har en konsultativ roll i samarbete med Unesco, liksom officiella förbindelser med FN och Europarådet. Esperanto möjliggör samtal på en mer neutral och jämbördig nivå vid mellanfolklig kommunikation, och skyddar på så sätt minoritetsspråk och inhemska språk genom att behandla alla språk på lika villkor, och respektera den kulturella och språkliga mångfalden hos dess talare.

http://uea.org/vikio/Unua_komuniko_en_la_sveda



La islandaj sagaoj en novaj svedaj tradukoj

Post ĉi-jare ĉiuj islandaj sagaoj estos publikigitaj en novaj svedaj tradukoj. La eldonistoj Kristinn Johannesson, Karl G. Johansson kaj Gunnar D. Hansson kondukas grandan projekton, kie dudeko da tradukistoj tradukis la sagaojn en la svedan. En tiu tradukprojekto mi havis la respondecon por dek sagaetoj, inter tiuj *Þórhalls þáttur knapps*, kiun mi nun ankaŭ tradukis en esperanton: La rakonto de Torhallur Knappur. Parto de ĝi estas prezentata ĉi-tie apude, sed la kompleta sagaeto estos publikigita en la nova retpaĝo de la islanda revuo La Tradukisto post ĉi-somere.

La islandaj sagaoj konsistigas gravan parton de la literatura historio de la mondo. Tamen povas esti malfacile trovi iajn sagaojn en librovendejoj kaj bibliotekoj. Ĉiuokaze nun oni nur devas atendi kelkajn monatojn por povi legi ĉiujn la sagaojn en nova sveda eldono, kaj kelkajn semajnojn por povi legi la tutan rakonton de Torhallur Knappur en la reto.

Joakim Lilljegen

Laŭ la informo ĉe UEA, ĝis nun aliĝis 39 svedaj geesperantistoj al la UK en Reykjavik. Entute aliĝis 965 personoj el 52 landoj.

La rakonto de Þórhallur Knappur

Viro nomiĝis Þórhallur kaj estis nomata Knappur. Li vivis en Knappstaðir en Fljót. Þórhallur devenis de potenca familio kaj liaj gepatroj estis loĝintaj en la bieno antaŭ li. Þórhallur estis justulo, kvankam li estis pagana kiel la plimulto en la regiono en tiu tempo. Li havis lepron kaj suferis multe de ĝi. Þórhallur oferis al idoloj, kiel lia familio kutimis fari. Ne malproksime de la bieno de Þórhallur estis granda pagana templo, kiun la homoj en Fljót posedis kune kaj kutimis uzi por ĉiujaraj oferceremonioj.

Unu nokton kiam Þórhallur dormis en sia lito, li sonĝis ke li estis eksterdome. Li vidis brilan viron veni rajdante al la bieno sur blanka ĉevalo. Li estis majeste vestita kaj portis oran lancon en sia mano. Kiam Þórhallur vidis la viron alproksimiĝi, li ektimis kaj volis kuri en la domon.

Sed la rajdanto estis pli rapida. Li desaltis de la ĉevala dorso, stariĝis antaŭ la pordo kaj diris: "Ne timu, ĉar ne trafos vin io malbona per mia alveno. Kontraŭe mia ĉeesto donos al vi sanon kaj feliĉon, se vi volas sekvi miajn konsilojn. Mi ne bezonas demandi ĉu vi malĝojas pro via malsano, ĉar mi scias ke vi malĝojas pro ĝi. Nun venu kun mi, kaj mi montros al vi sekuran

manieron esti liberigita de via malsano."

La vizitanto kondukis lin ien ekster la ĝardenbarilo kiu ekzistis ĉirkaŭ la bieno, kaj diris al li: "En ĉi tiu loko vi lasu konstrui domon dediĉita al la ununura kaj vera Dio, laŭ la maniero kiun mi montros al vi. Ĉi tiu Dio estos predikata al vi nun post ĉi-jare en la kunveno de la Alþingi, ĉar vi rajdos certe al la kunveno ĉi tiun someron. Se vi poste kun pura koro adoros la Dion kiun ili predikos al vi tie, vi estos sana, kaj kun sana korpo vi trankvile ĝojos en ĉi tiu mondo. Kaj en la venonta mondo vi ĝuos eternan gloron kaj feliĉon."

...

Dum tiu tempo loĝis virino kiu nomiĝis Þórhildur en la najbarbieno proksime. Ŝi estis forta virino kaj tre lerta pri magio.

La saman nokton kiam Þórhallur havis la menciitan sonĝon, Þórhildur vekis siajn homojn jam je la tagiĝo kaj diris: "Vi devas kiel eble plej rapide foriri por kolekti ĉiujn niajn brutojn de la paŝtejoj kaj veni hejmen kun ili, bovoj, ŝafoj kaj ĉevaloj. Poste fermu ilin en la stalojn kaj ĉirkaŭfermejojn, ĉar tiu kiu eliras sub la libera ĉielo ĉi tie hodiaŭ ne restos viva. Mia najbaro Þórhallur en Knappstaðir tute perdis la saĝon kaj sendis siajn homojn por malkonstrui la

sanktan templon tie. Tiam la grandaj dioj, kiujn oni adoris tie, estos devigataj fuĝi en kolero kaj serĉi protekton kaj hejmon tiel for norde kiel Siglunes. Mi ne volas ke miaj bestoj estus en la vojo kie ili iros, ĉar ili estos tiel koleraj kaj furiozaj ke ili malverŝajne ŝparos la vivon de iu kiu baros al ili la vojon.

Oni faris kiel ŝi diris, kaj ĉiuj ŝiaj brutoj estis movitaj hejmen kaj enfermitaj, krom unu pakĉevalo kiu restis en la kampoj. Tiun oni poste trovis morta.

Sed por Þórhallur en Knappstaðir okazis ĉio, kio estis rakontita al li en la revelacio. Li iĝis laŭtage pli sana kaj liaj povoj kreskis. En la somero li rajdis al la kunveno de la Alþingi, kaj tie li renkontis tiujn, kiuj predikis la kristanan evangelion, pri kio baldaŭ estos rakontita [aliloke en Flateyjarbók, sed ne en ĉi tiu teksto / noto de la tradukisto]. Þórhallur transiris al la vera fido, kaj tuj kiam li estis baptita, lia korpo estiĝis plene restarigita. Poste li iris feliĉe hejmen al sia bieno, kaj dum la resto de sia vivo li adoris la ĉiopovan dion en la preĝejo, kiun li dediĉis al li, la unua kirko konstruita en Fljót en la nomo de la patro, de la filo kaj de la sankta spirito, la triunuo, kiu estu honorita kaj glorita tuteterne. Amen.

SOMMARVECKA MED ESPERANTO

GÖTEBORG 8 – 12 juli 2013

Svenska Esperanto-Institutet (www.esperantoinstitut.se) inbjuder härmed till sommarkurser i esperanto. Kurserna ordnas i samarbete med Studieförbundet Vuxenskolan Göteborg. Kurslokal: Karl Gustavsgatan 15, mitt emellan Götaplatsen och Järntorget.

Tre nivåer:

- A. Nybörjarkurs: börjar från "noll"
- B. Påbyggnadskurs: för den som har en viss grund i esperanto och vill lära sig mer
- C. Fortsättarkurs: för den som vill öva upp sin språkliga förmåga

Tre undervisningspass per dag:

förmiddag, eftermiddag och kväll. Kvällspassen ägnas åt studiebesök, stadsvandring, kulturaktiviteter etc. på esperanto och svenska. En halvdagsutflykt planeras "om vädergudarna vill".



Lärare: A. Lars Forsman
B. Folke Wedlin
C. Inga Johansson

Kursavgift:

750 kr. I avgiften ingår ej kost och logi.

Anmälan och kontakt:

Institutets rektor Lars Forsman
Tel 0586 - 54811

La franca Esperanto-kastelo Greziljono

La franca Esperanto-kastelo Greziljono invitas vin al interesaj semajnoj: somera programo (semajnoj turisma, artamatora, alternativa, infana, teatra), aŭtuna feriado oktobrofine kaj al jarfina festego kun novjara festeno.

Vidu detalon rete en www.gresillon.org/somero aŭ gresillon.org/agendo

Kontaktu nin:

- telefone al +33-2.41.89.10.34 aŭ
- retletere al kastelo@gresillon.org aŭ
- letere al MCE Gresillon, St.Martin d'Arce, 49150 Bauge en Anjou, France.



=====
Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 494

2013-04-03
=====

Pli ol 3500 ŝatantoj de UEA en Facebook

La nombro de ŝatantoj de la paĝo de UEA en la socia retejo Facebook ("Vizaĝlibro") atingis 3500 la 31-an de marto. La paĝo estis kreita la 5-an de novembro 2009.

71,2% de la ŝatantoj estas viroj kaj 27,3% virinoj, dum 1,5% ne anoncis sian sekson. Per sia Facebook-paĝo

UEA atingis publikon, kiu estas multe pli juna ol la kotizanta membraro. Entute 40,5% de la ŝatantoj estas malpli ol 35-jaraj, dum inter la individuaj membroj ilia proporcio estas 7,3%.